

# Slavonaj skriboj

Eseo de Sergio Pokrovskij

|| Pli frua versio de ĉi tiu eseo aperis en «La Ondo de Esperanto», 1998, № 12 kaj 1999, № 1–4.

Leganto (S. Paĥomov) petis min komenti gazetan artikolon pri Cirilo, Metodio kaj la rusa alfabeto. La temo estas riĉa kaj instrua. Precipe se oni komparas tion, kion *ni* opinias grava en la agado de la tesalonikaj fratoj (la alfabeto, la slavona literaturo), kun la prioritatoj de la mezepoka socio de antaŭ 11 jarcentoj. Diversaj epokoj kaj kulturoj lasis pri tio malsamajn atestojn.

## Enhavtabelo

Atesto slavona.....	3
La historia fono.....	5
Inter Romo kaj Konstantinopolo.....	7
Kiel pereis la Imperio.....	9
La relikvo de sankta Klemento.....	11
Inter Romo kaj Salcburgo.....	12
La veraj patriarkoj.....	14
Vanaĵo, vantaĵo, vantaĵo.....	15
La du slavonaj alfabetoj.....	18
Noto pri la liternomoj.....	22

Argumentoj.....	23
Duonjarmilon antaŭ Renesanco.....	25
Misiistaj alfabetoj kaj 𐌆𐌇𐌈𐌉𐌊𐌋𐌌𐌍𐌎𐌏𐌐.....	27
Cirilo la Filozofa.....	29
La fabelo kaj la realo.....	31
Ĉu hazarda koincido?.....	32
La trilingva herezo.....	34
La lingvo de Adamo.....	34
El letero de Aristeo.....	36
La versio talmuda.....	38
La kulturlingvo de la klasika epoko.....	38
La kulturlingvo de la «Sovaĝa Okcidento».....	39
Pilatismo.....	41
Pri Slavono.....	43
La parencorilatoj.....	46
La skribo fenica.....	46
La alfabetoj grekaj.....	49
La etruska alfabeto.....	50
La alfabeto latina.....	51
Kirilico.....	53
Literaturo.....	54

# Atesto slavona

Tio estis en la tempo de Miĥaelo la imperiestro greka, kaj Boriso princo de Bulgarujo, kaj Rastislavo princo de Moravio, kaj Kocelo princo de Balatono,<sup>1</sup> kaj Ruriko princo de Novgorodo,<sup>2</sup> en la jaro de l' mondo 6371<sup>a</sup> [862/863 de Kristo]. Tiam Rastislavo de Moravio, inspirite de Dio, interkonsilinte kun siaj princoj kaj la moravianoj, sendis al imperiestro Miĥaelo dirante:

Niaj homoj forĵetis paganismon kaj sekvas la leĝon kristanan; sed venis al ni multaj instruistoj italaj, grekaj kaj germanaj, kiuj instruas al ni malsame; dum ni slavoj estas homoj simplaj kaj mankas al ni tia instruisto, kiu en nia lingvo nin gvidu al ĉia justo,<sup>3</sup> por ke ankaŭ aliaj landoj, vidante tion, imitu nin.

Tial, Bona Sinjoro,<sup>4</sup> bonvolu sendi al ni tian episkopon kaj instruiston, ĉar de vi ĉien disvastiĝas bona leĝo.

[1] **Balatono**: «и Коцелна кѣнаса блатъньска». Mi modernigis la loknomon *Blatno* por la oportuno de la moderna leganto; la hungaroj venos poste kaj konkeros Panonion en la jaro 905<sup>a</sup>. Sed eĉ en la hungareca formo *Balatono* rekoneblas la rusa *Bolotnoje* (la marĉa) — ekz-e tiel nomiĝas urbeto apud Novosibirsko. **Kocelo** estis princo ekde la jaro 861<sup>a</sup>.

[2] Mencio pri **Ruriko** en la originalo de Ĥrabro [MĤ] kompreneble malestis, sed rusaj kopiistoj ĝin enŝovis, kaj mi volonte ĝin retenas. Efektive, laŭ la kronikoj Ruriko venis Novgorodon en la 6370<sup>a</sup> jaro.

[3] **justo**: «иже ны исправи всяку правду». Ne maleblas, ke temas pri la Romiaj leĝoj; kaj ĉi tiun esprimmanieron de **VM** probable influis *Ĵn* 16:13 kaj *Mt* 3:15.

[4] **Bona Sinjoro**: titolo de imperiestro (ἄρτιος δεσπότης).

Aŭdinte tion imperiestro Miĥaelo diris al filozofo Konstanteno<sup>5</sup>:

— Ĉu vi aŭdas, filozofo, tiun parolon? Neniu krom vi povos fari tion. Jen, mi donas al vi multe da donacoj, iru kun via frato abato Metodio. Ĉar vi estas el Tesaloniko, kaj ĉiuj tesalonikanoj bone parolas la slavan.

La filozofo respondis:

— Mi laciĝis, mia korpo estas malsana, sed ĝoje mi tien iros, se ili havas skribon en sia lingvo.

La imperiestro diris:

— Mia patro, kaj mia avo, kaj multaj aliaj esploris tion, sed sensukcese.

— Kiu do aŭdacos skribi parolojn sur akvon<sup>6</sup> kaj misfamigi sin herezulo? — diris la filozofo.

— Se vi volos, Dio donos al vi tion, kiel li donas al ĉiuj pentantaj sen dubo kaj malfermas al la frapantaj, — respondis la imperiestro.

---

[5] **filozofo Konstanteno**: pli ĝuste estus traduki: «*profesoro* Konstanteno», ĉar la titolo simple indikas, ke Konstanteno instruis teologion en la Akademio Magnaura. Sed tiam la okcidenta tradicio universitata ankoraŭ ne ekzistis, kaj tia traduko impresus anakronisme.

[6] *skribi sur akvon*: «и кто может на воду бесѣду писати и ѳетичьско име себѣ обрѣсти». Gramatike klara, tiu frazo estas malfacile rilatigebla al la situacio. Ofta interpreto: sen skribo la afero estos vanaĵo (la greka ἐν ὕδατι γράφειν, «skribi sur akvon», onidire povas signifi «vane klopodi»). Alia ebla interpreto: ne fiksitajn skribe predikojn oni facile misinterpretos kiel herezojn. Ĉiel ajn, la aŭtoro de [VK](#) volis atribui al la imperiestro aprobon de slavona skribo.

Tiam neniu aŭdacis malobei Dion aŭ la imperiestron, laŭ la diro de sankta apostolo Petro: «Dion timu, la reĝon honoru» [1Pt 2:17]. La filozofo foriris kaj laŭ la malnova kutimo li preĝis kun siaj helpantoj. Kaj baldaŭ inspiris lin Dio, aŭdanta la preĝojn de siaj sklavoj. Li kunmetis literojn kaj skribis la vortojn de la evangelio [Jn 1:1]:

ИСКОНИ БЪ СЛОВО И СЛОВО БЪ ꙗко БОГА И БОГЪ БЪ СЛОВО

Ekĝojis la imperiestro, kaj gloris Dion, kaj sendis la filozofon kaj lian fraton kun multaj donacoj kaj jena letero al Rastislavo:

Dio, kiu volas ke ĉiu eksciu la veron kaj atingu pli altan gradon, vidis vian fidon kaj fervoron; rivelinte skribon por via lingvo, li niatempe faris tion, kio ne plu okazis de post la unuaj tempoj: ke vi estu alkalkulitaj al la grandaj nacioj glorantaj Dion en sia lingvo.

Tial ni sendas al vi tiun, al kiu Dio ĝin rivelis, viron honorindan kaj pian, klerulon kaj filozofon ...

## La historia fono

La ĵusan sekcion mi kompilis el tri fontoj slavonaj [[MĤ](#), [VK](#), [VM](#)], verkitaj jam post la morto de la tesalonikaj fratoj, sed kiam ankoraŭ vivis iliaj disĉiploj (la plej malfrua fonto [[MĤ](#)] konstatas: «Ĉar ankoraŭ vivas vidintaj ilin»). Evidente, jam tiam la tempo elstarigis la ĉefan kaj forgesigis tion, kion la roluloj mem opiniis plej aktuala kaj grava.

Ĉar Rastislavo havis zorgojn multe pli urĝajn ol la filologiaj. La Grandan Moravion, unuigitan ĉ. la jaro 830<sup>a</sup> de princo Mojmiro, minacis ĝia okcidenta najbaro.

Antaŭ 30 jaroj la Franka Regno disfalis. La malpli aĝaj nepoj de Karolo la Granda: Ludoviko la Germana kaj Karolo la Kalva, aliancis kontraŭ sia frato imperiestro Lotaro, gajnis la batalon ĉe Fonteneto (nun *Fontenoy*), kaj ĵuris eternan dispartigon en Strasburgo (842). Ludoviko la Germana ĵuris en la latinida nordfranca antaŭ la militistoj de Karolo la Kalva; tiu lasta ĵuris en la malnovgermana antaŭ la militistoj de Ludoviko.

Ludoviko ne sciis ke lian *ĵuron de Strasburgo* en la sekva jarcento kronikisto enŝovos en sian kronikon, kaj ĝi iĝos la plej antikva konata teksto en la malnovfranca lingvo.

Ĉiel ajn, tiel naskiĝis la germana nacio, kaj Ludoviko la Germana iĝis la unua reĝo de Germanujo (de Rejno ĝis Elbo; en la teritorio de Germana Demokratia Respubliko vivis slavo kaj prusoj, ankoraŭ ne ekstermitaj per germana-pola kristanigo). En la jaro 846<sup>a</sup> li invadis Moravion, forigis Mojmiron kaj surtronigis ties nevon Rastislavo. En la 855<sup>a</sup> Ludoviko ankoraŭfoje militiris Moravion, sed fiaskis, kaj Rastislavo rifuzis pagi la tributon.

Nun Ludoviko denove preparis militon sudoriente de sia regno. Li aliancis kun bulgara ĥano Boriso, tiel ke Moravion minacis invado kaj de la Okcidento kaj de la Sudo. Laŭ la logiko de transnajbaraj aliancoj, Rastislavo serĉis helpon de Bizancio, la suda najbaro de Bulgarujo.

Kaj la helpo venis. Ĵus (863-09-03) Bizancio gajnis grandan batalon kontraŭ emiro Umaro de Meliteno (Μελιτηνή, nun *Malatya* [malatja'] en Turkujo), kaj sekura en la civilizita Azio, ĝi povis iom atenti aferojn en la barbara Eŭropo. Per sukcesa kampanjo ĝi igis Borison rompi la aliancon kun Ludoviko, kaj akcepti bapton el Bizancio (Boriso estis aliĝonta al Romo). En la bapto ĥano Boriso ricevis la nomon Miĥaelo — omaĝe al la 24-jara imperiestro Miĥaelo la Tria la Drinkemulo, kiun ni renkontis en la ĵusa epizodo.

Tiujare Ludoviko ne invadis Moravion; anstataŭe li disbatis sian filon Karlomano de Bavarujo.

## Inter Romo kaj Konstantinopolo

Tamen la urĝaj zorgoj politikaj ne malebligas intertraktadon kulturan kaj religian, pri kiu sola raportas la fontoj. Kaj impresite de tiuj raportoj kaj de la postaj polemikoj ekleziaj, iuj historiistoj tiel resumas la celojn de la moravia ambasado:

1. la ĉefa cirkonstanco de la konsiderata afero estis konflikto inter la «pilatisma Romo»<sup>7</sup> kaj la pli permesema Konstantinopolo, kaj
2. Rastislavon interesis la kultura aspekto, klerigo de moravianoj en klara lingvo.

Mi citu el tia libro<sup>8</sup>:

La bizancia eklezio disvastigis kristanismon per metodoj

[7] Pri «pilatismo», aŭ «[la trilingva herezo](#)» mi parolos poste.

[8] В.А. Истрин: 1100 лет славянской азбуки. — М.: Наука, 1988.

malpli ferocaj ol la okcidenta. Ĝi ne trudis eklezian imposton (la dekonajon) sur la popolojn kaj landojn, kvankam akceptis libervolajn donacojn. Ĝi ne malhelpis kreon de naciaj skriboj ĉe la kristanigitaj nacioj, evoluigon de ilia kulturo, tradukadon de la kultaj libroj kaj eĉ de la liturgio. Tiel en la Oriento aperis aŭ plu ekzistis:

- la kopta skribo de la egiptaj kristanoj (de 2<sup>a</sup>–3<sup>a</sup> jc, ĝis la deviga arabigo de la civila skribo en 705);
- la gota skribo de episkopo Vulfilo;
- la armena skribo de episkopo Mesropo Maŝtoc (ĉ. 406);
- la skriboj siriaj, hebrea, araba, kartvelaj, etiopa;
- la skriboj slavonaj, kiuj estas nia temo.

Fakte Moravio kristaniĝis jam sub Mojmiro, sed malgraŭ insistaj demandoj de princoj moraviaj Romo rifuzis instali tie episkopon. Eklezie ĝi estis subordigita al Bavarujo, kiu ne estis pacema najbaro. En sia baldaŭa letero (en la jaro 864<sup>a</sup>) papo Nikolao deziras sukceson al Ludoviko la Germana en lia militiro kontraŭ Moravio. Tial la raporto pri provo de Rastislavo ricevi episkopon el Nov-Romo<sup>9</sup> estas sufiĉe versimila; precipe se kompari tion kun la samtempa kaj pli bone dokumentita marĉandado de Boriso-Miĥaelo de Bulgarujo, finfine ricevinta eklezian aŭtonomion el Konstantinopolo.

Sed Rastislavo pri tio malsukcesis. Ĉu Konstantinopolo rigardis instalon de moravia episkopujo nerealigebla, ĉu pro alia konsidero, sed ankaŭ ĝi ne donis episkopon al Rastislavo.

---

[9] La oficiala bizancia nomo de Konstantinopolo (*Nova Roma*, Νέα Ρώμη).



Anstataŭe estis senditaj Konstanteno, pastro sed ne monaĥo, kaj lia frato Metodio, monaĥo sed ne pastro.

Nur en la jaro 6378<sup>a</sup> (869/870) Metodio iĝos ĉefepiskopo. Kaj paradokse, instalos lin papo Hadriano la Dua de Romo.

Alivorte, la tradicia prezento de la batalo pri la slavonaj skribo kaj liturgio kiel konflikto inter Romo kaj Konstantinopolo estas nesufiĉa. Ĉar estis tria partio: La Okcidenta Imperio.

## Kiel pereis la Imperio

Je 797-08-15 matene imperiestro Konstanteno la Sesa, ĵus renversita de sia patrino la imperiestrino Ireno (Εἰρήνη), iĝis blindigita laŭ ŝia ordono en tiu sama Purpura Ĉambro, kie li naskiĝis antaŭ 26 jaroj. De tiam Ireno sin titolis *imperiestro* (Ireno, fidela bazileŭso kaj aŭtokratoro de la romianoj) kaj regis meme, sen edzo aŭ amanto.

La skandalo estis granda. La papoj de Romo dum pli ol 50 jaroj milde toleris la batalon de la ikonrompistaj imperiestroj kontraŭ la sanktaj relikvoj, kaj ekskomunikinte ilin pro la herezo, tamen plu datis siajn dokumentojn per ilia nomo kaj havis ilian portreton sur siaj moneroj. Sed ĉi tiam la papa pacienco elĉerpiĝis. Kvankam Ireno dum la infanaĝo de Konstanteno venkis la ikonrompistojn kaj reunuigis la Eklezion, ĉi tiu skandalo estis supermezura. Papo Leono la Tria invitis Karolon la Grandan en Romon kaj tie je la Kristnasko 800-12-25 lin kronis kaj proklamis imperiestro (*Aŭgusto*).

Cetere, oni ne pensu ke la liberajn frankojn ŝokis la blindigo. Tio estis rutina politika procedo, ekzemploj pri kiu troveblas eĉ inter la roluloj de nia rakonto. Tiel Ludoviko la Germana ordonos blindigi Rastislavon (870); kaj Miĥaelo-Boriso, sian filon Vladimiron, kiu provos reveni al paganismo. Ankaŭ Karolon la Grandan ne ŝokis la krimo (nek la suspektindaj cirkonstancoj eĉe kiuj iam subite mortis la edzo de Ireno imperiestro Leono la Kvara), kaj li galante sendis al Ireno siajn svatantojn; sed ili venis tro malfrue, kiam Ireno jam perdis la tronon (802). Ŝi finis sian vivon pentofarante en monaĥinejo, kaj baldaŭ la eklezio ŝin deklaris sanktulino.

La skandalo konsistis en tio ke Ireno estis virino, la unua (kvankam ne lasta) regnestrino Romia. Laŭ la okcidentanoj la imperiestra trono vakis, ĉar ĝin ne povis okupi ino.

Tiam oni ankoraŭ ne pensis pri «restaŭro de la Okcidenta Imperio». Laŭ la antikva pensmaniero, Imperio povis esti nur unu, kvankam de post Diokleciano ĝi ofte havis plurajn imperiestrojn. Sed ĝi estis unu sola ŝtato, same kiel Rusujo estis unu regno dum la kunregado de Petro la Granda kaj lia pli aĝa frato Johano la Kvina. La informo el la lerneja historio: «En la jaro 476<sup>a</sup> falis la Okcidenta Roma Imperio» formale estas malĝusta, ĉar

1. tia aparta imperio tiam ne ekzistis, kaj
2. Odoakro abolis ne imperion, sed imperiestron.

Detroniginte Romulon Aŭgustulon, li igis la Senaton sendi ambasadon en Konstantinopolon por deklari al imperiestro

Zenono, ke Italio ne bezonas apartan imperiestron, ke sufiĉas ke Zenono faru Odoakron patricio kaj komisiu al li administri Italion. Kaj Zenono bonvolis plenumi tiun peton. Karolo pretendis sekvi ne Romulon Aŭgustulon, sed Zenonon, Anas-tazon, Justenon, Justinianon – la Nov-Romajn imperiestrojn. La okcidentaj kronikoj lin listigas tuj post Konstanteno la Sesa.

La aparta «Sankta Roma Imperio [de la germana nacio]» aperos jarcenton post la tesalonikaj fratoj, jam sub la Otonoj (962). Ĝuste tiam formale disfalos la Imperio. En la 9<sup>a</sup> jarcento oni ankoraŭ konceptis imperion kiel unu tuton, la ekleziaj skis-moj ankoraŭ ne definitiviĝis, kaj tio klarigas kial Konstanteno kaj Metodio tiel facile iris Romon por aranĝi siajn konfliktojn kun la germana klerikaro.

## La relikvo de sankta Klemento

En decembro de la jaro 867<sup>a</sup> la fratoj alportis en Romon du valoraĵojn: siajn librojn en Slavono kaj relikvon de sankta Klemento, «la tria papo post sankta Petro». Tiun relikvon Konstanteno malkovris en Krimeo, je 860-12-30 (aŭ 861-01-30) dum sia misio en Ĥazarujon. Parton de la skeleto li lasis en Ĥersono (poste sankta Vladimiro ĝin transportos en Kievon), kaj la reston li dum 7 jaroj kunportadis en siaj vojaĝoj. Tute seninteresa en Bizancio, ĝi faris furoron en Romo. Konstanten-on akceptis la plej altrangaj ekleziuloj, komencante per Hadriano la Dua mem, kiu iris ekster la urbon por renkonti la

*reliquias beati Clementis*, bonan aŭguron por la ĵus (la 14<sup>an</sup> de decembro) elektita papo.

La romanoj alte aprezis la scion kaj pion de Konstanteno, kaj priskribis lin ne alie ol «viro de apostola vivo», «saĝegulo», «vere mirinda filozofa», «granda homo kaj apostolseĝa instruisto» ktp (*vir apostolicæ vitæ, sapientissimus vir, mirabilis vere philosophus, vir magnus et apostolicæ sedis præceptor*).

Ĉe homo tiom estimata oni facile toleris lian slavonan elpensajon. La papo pastrigis Metodion; la slavaj disĉiploj de la fratoj iĝis diakonoj; kaj la papo eĉ okazigis diservon super la slavonaj tradukoj de la fratoj.

Tiel ili pasigis en Romo du jarojn. Konstanteno estis grave malsana, 50 tagojn antaŭ sia morto li monaĥiĝis sub la nomo *Cirilo* (tial *Cirila* alfabeto) kaj mortis la 14<sup>an</sup> de februaro de la jaro 6377<sup>a</sup> (869). La episkopo de Velletri raportas, ke lian enterigon akompanis honoroj kutime rezervitaj por la papoj.

Post la morto de Konstanteno-Cirilo la papo konsekris Metodion ĉefepiskopo de Panonio.

## Inter Romo kaj Salcburgo

La frankoj estis potenca, sed ankaŭ timinda aliancano por Romo. Karolo kredis sin instalita de Dio, kaj senĝene aranĝis ekleziajn aferojn. Ekz-e la dekonajojn kaj trionon da enspezoj de ankoraŭ ne kristanigita Panonio (en kiun li inkludis la teritorion de la onta Granda Moravio) li favordonis al la Salc-

burga ĉefepiskopo, iĝinta *primaso de Germanujo*. Kompreneble tio malplaĉis al Romo.

La veno de la tesalonikaj fratoj minacis la interesojn de la germana klerikaro kaj prezentis ŝancon al Romo. Al la reala forto de la Franka regno Romo povis kontraŭmeti nur «la eternajn rajtojn de la Sankta Seĝo»:

1. Panonio, kaj la tuta Ilirio ĝis Tesaloniko, apartenas al la Roma patriarkujo. Ties ĉefepiskopo (fakte, metropolito) devas rezidi en la antikva Sirmiumo (nun *Sremska Mitrovica*, 70 km okcidenten de Beogrado), kies katedron, gloran ankoraŭ en la pagana Romio, fondis Androniko, «apostolo el la sepdekopo».
2. Por la eterna Eklezia tradicio neniom gravas, ke tiu lando repaganiĝis (post la invado de hunoj, kiam la Iliria ĉefurbo translokiĝis en Tesalonikon, la naskiĝurbon de la fratoj; iam inter 424–426 Sirmiumo ree iĝis ĉefurbo, sed post la pirabo fare de la avareoj<sup>10</sup> en 582 tiu eklezia provinco Ilirio fakte ĉesis ekzisti).
3. La dekreto de Karolo la Granda ke eklezie Panonio estu regata el Salcburgo ne validas, ĉar temas pri teritorio de sankta Petro.
4. Cetere, ĉio ĉi tio kompreneble «neniel atencas la rajtojn de la glora ĉefepiskopujo Salcburga».

[10] Latine *avares*, *avari*, mislego de la mezgreka ἄβρα; memnome probable estis *apar*, kp la malnovrusan авръ. La formon «avareo» uzis J. Lindstedt (*Literatura Foiro*, 1996:2).

Nu, la bavaraj episkopoj malkonsentis. Ili kaptis Metodion kaj juĝis lin en Regensburgo antaŭ Ludoviko la Germana. *Reverentissimus Methoduis archiepiscopus Pannoniensis ecclesiæ* kaj papa legato misia (*ad gentes*) iĝis «iu greko, nomata Metodio» (*quidam Græcus Methodius nomine*), konfuzanta la popolon per «nove inventitaj slavaj literoj». Batita kaj kondamnita, Metodio preskaŭ tri jarojn restis malliberigita en Ŝvabujo, ĝis iel li sukcesis informi la novan papon Johanon la Okan pri tiu perforto.

En 873 papa legato Petro de Ankono igis la germanojn liberigi Metodion, minacante per interdikto. Malvolonte ili obeis; «tamen la juĝon de sankta Petro ili [la juĝintaj episkopoj] ne evitis, kaj 4 el ili mortis» [VM, ĉap. 10]. Efektive, kvar bavaraj episkopoj baldaŭ mortis, komencante per Adalveno de Salcburgo (873-05-14).

## La veraj patriarkoj

La pozicion de Romo pri la principo de «apostola katedro» bone ilustras respondo de sankta Nikolao la Unua la Granda je unu el la «demandoj de la bulgaroj» okaze de ilia kristaniĝo. (Nur tri papoj havas la epiteton «Granda»; kvankam lia politiko tute fiaskis, Nikolao la Unua efektive estis eksterordinare vanta kaj obstina, kion la historiistoj nomas «la granda karaktero».)

Boriso demandis, interalie, kiom estas da veraj patriarkoj (*veraciter patriarchæ*), kaj ĉu Bulgarujo povas havi sian?

Nikolao respondis, ke ili estas tri: la Roma, la Aleksandria kaj la Antioĥia. Estas ankoraŭ du neveraj patriarkoj, la episkopoj de Konstantinopolo kaj Jerusalemo; ĉar la verajn patriarkajn katedrojn fondis la ĉefapostoloj (*principes apostolorum*) Petro kaj Paŭlo.

Nu, la Konstantinopolan katedron

1. ne fondis apostolo;
2. la Nicea koncilio (325 p.K.), la plej glora kaj honorinda, ĝin ne menciis (*Bizanco iĝis Konstantinopolo* poste, 330-05-11);
3. nenio ĝin elstarigas krom la administra rolo — sed la Eklezio ne atentis administraĵojn.

La Jerusalema katedro havas kiel eble plej aŭtoritatan Fondinton, kaj la Nicea koncilio ĝin menciis — sed ĉion neripareble fuŝas administra konsidero: ĝi estas menciita sub sia tiama nomo *Ælia Capitolina*.

Kompreneble, se por Nikolao la Granda eĉ la Jerusalema patriarko ne estis vera, tute vana estis la espero de Boriso ricevisian patriarkon bulgaran. Cetere Nikolao indikis, ke Romo kutime nomumas ĉefepiskopon por katedro fondita de apostolo aŭ por malproksima lando, kiam pro konsiderinda kresko de la popolo kristana tie aperas pluraj episkopoj. Tiu respondo eble estis kroma motivo por okcidentaj konkeroj bulgaraj.

## Vanaĵo, vantaĵo, ventaĵo

Krom la liberon, Petro de Ankono alportis al Metodio malpermeson diservi en Slavono. Tamen revokite en Romon,

Metodio sukcesis akiri la plej kompletan aprobon de la slavona diservo (junio 880):

Ni prave aprobas (*jure laudamus*) la slavonan skribon eltrovit- an de Cirilo en kiu Dio estas propre laŭdata, kaj ni ordonas (*jubemus*) ke la gloraĵoj kaj faroj de nia Sinjoro estu dirataj en tiu lingvo. Nek kontraŭas al la doktrino kaj kredo servi meson en tiu slavona lingvo ...

Metodio mortis la 3<sup>an</sup> de aprilo de la jaro 6393<sup>a</sup> (885). Tuj post lia morto papo Stefano la Kvina en sia letero al moravia «reĝo Svętopolko» (*Zventopolco regi Sclavorum*) malpermesis slavon- an diservon:

Kaj la diservojn kaj la sanktajn sakramentojn kaj la solenajn mesojn, kiujn tiu Metodio (*idem Methodius*) aŭdacis (*præsump- tis*) celebri en Slavono, ĉesigu ... Kaj la obstinulojn kaj la mal- obeulojn, kiuj insistos kaj kontraŭos post la unua kaj dua admonoj, forpelu el la sino de la eklezio kiel lolsemantojn, kaj, por ke unu fava ŝafo ne infektu la tutan gregon, ni ordonas perforte bridi ilin kaj ekzili malproksimen de via lando.

Senditoj de la papo observis plenumon de tiuj instrukcioj. La pli junajn disĉiplojn de Metodio konsentis aĉeti migraj sklavist- ojn (kelkajn el ili poste elaĉetis sendito de Bazilo la Makedono en Venecio); la pli aĝajn necesis ekzili; ili rifuĝis en Bulgarujo.

La afero de Cirilo kaj Metodio kuŝis en ruino. Papoj ripetis malpermeson de slavona liturgio (Stefano la Kvina, 890; Johano la Deko, 915). La germana klerikaro venkis.

Post 20 jaroj Arnulfo de Bavarujo en alianco kun la venontaj de Oriento hungaroj finfine realigos la dispartigon de Moravio;



tiel vaniĝos kaj la kristanigo de Panonio, kaj la ekleziaj kvereloj inter Salcburgo kaj Romo. La politikaj konfliktoj, kiuj ŝajnis gravaj kaj aktualaj, perdos ĉian valoron.

Restos nur nepalpebla bagatelaĵo: la slavona skribo kaj literaturo, pro kiuj solaj ni rememoris tiujn vantaĵojn.

Cetere, nun la rado de la historio faris plenan turnon. La ideo de multepatruja Eŭropa unio iel proksimas al la bizancia multelingva imperio, kiun enkorpigis la sanktaj fratoj. En Strasburgo, kie la franca-germana dispartigo estis ĵurita, nun kunsidas la Eŭropa parlamento; la Roma eklezio rezignis pri la meso latina; papo Johano Paŭlo la Dua deklaris sanktajn Cirilon kaj Metodion patronoj de la unuiĝanta Eŭropo (la encikliko *Slavorum apostoli* de 1985-06-02).

En Ortodoksujo la festo de la fratoj estas je la 11<sup>a</sup> de majo; ĉi tiu tago, gregorie la 24<sup>a</sup> de majo, en Bulgarujo kaj Ruslando estas ŝtata Skribofesto. En Moravio la feston de Cirilo kaj Metodion oni celebris la 5<sup>an</sup> de marto; papo Pio la Naŭa movis la feston al la 7<sup>a</sup> de julio. Post la Dua Vatikana Koncilio Romo movis la feston al la 14<sup>a</sup> de februaro.

Nun tempas ekzameni ĉi tiun eternan valoron, esplori ĉu vere ĝi estis pli daŭrema. Nun sekvas la demando:

**Kiu Cirilo kiun alfabeton kreis?**

# La du slavonaj alfabetoj

Mirinda afero: ĉiuj historiaj fontoj parolas nur pri *unu* nove inventita slavona alfabeto, kvankam ni bone scias, ke ili estis *du*:

1. **Kirilico**,<sup>11</sup> nomita laŭ sia kreinto *Cirilo*, kaj
2. **Glagolico**, laŭvorte «parolaĵo».

La du alfabetoj tre proksimas interne, laŭ siaj strukturo, ordo kaj la nomoj de la literoj; sed ili draste malsimilas ekstere, laŭ la aspekto kaj dizajno grafika. Fakte ili havas nur unu komunan signobildon: ш (t.e. ŝ); kaj la kirilicaj *usoj* А kaj Х ŝajnas turnita glagolica € . La distinga principo estas la rilato al la greka alfabeto: Kirilico estas, maldetale, la mezgreka uncialo kompletigita por la bezonoj de la slava fonetiko; dum Glagolico zorge evitas ion ajn similan al la pagana alfabeto greka (aŭ latina).

Dum kelka tempo la du alfabetoj kunekzistis paralele en la tuta Slavujo; glagolicajn grafitiojn oni trovis eĉ en Kievo kaj Novgorodo.

Nun regas la opinio ke sankta Cirilo elpensis Glagolicon, kiu poste iel proksimiĝis al la greka alfabeto, kaj tiel estiĝis Kirilico kaj la nunaj alfabetoj Cirilaj. Laŭ tiu teorio, sankta Cirilo skribis ne tiel:

ИСКОНИ БЪ СЛОВО И СЛОВО БЪ ѿ БОГА И БОГЪ БЪ СЛОВО  
sed ĉi tiel:

---

[11] **Kirilico**: Tiel mi nomas la slavonan alfabeton абвгд ... ѠѢѤѦѧ kontraste al la pli ĝenerala termino *literoj Cirilaj*, kiu kovras ankaŭ la modernan rusan alfabeton civilan.

**ጽሑፍ ለግሪግ ስርዓት ለግሪግ ስርዓት ለግሪግ ስርዓት ለግሪግ ስርዓት**

Pli sisteman superrigardon de la du alfabetoj donas la ĉi-suba tabelo. Fakte la formo kaj la funkcioj de la literoj variis laŭ epokoj kaj landoj; interalie, Kirilicon mi prezentas en ĝia moderna «civila» formo.

Glagol.	Cifere	Nomo	Kiril.	Sono	Cifere
ⴐ	1	azo	A	[a]	1
ⴑ	2	buko	Б	[b]	
ⴒ	3	vedo	B	[v]	2
ⴓ	4	glagolo	Г	[g]	3
ⴔ	5	dobro	Д	[d]	4
ⴕ	6	esto	E	[e]	5
ⴖ	7	ĵivo	Ж	[ĵ]	
ⴗ	8	dzelo	S	[dz]	6
ⴘ	9	zemlo	З	[z]	7
ⴙ	10	i-dek   i-ok	И	[i]	8
ⴚ   ⴛ	20	i-dudek   i-dek	I	[i]	10
ⴜ	30	ĝervo	(ĥ)	[ĝ] / [ĉ]	
ⴝ	40	kako	K	[k]	20
ⴞ	50	ludo	Л	[l]	30
ⴟ	60	mislo	M	[m]	40
ⴠ	70	naŝo	N	[n]	50
ⴡ	80	ono	O	[o]	70
ⴢ	90	poko	П	[p]	80
ⴣ	100	rico	P	[r]	100
ⴤ	200	slovo	C	[s]	200

Њ	300	tverdo	T	[t]	300
Ѓ	400	uko	oy, ѳ	[u]	400
Ф	500	ferto	Ф	[f]	500
Ь	600	ĥero	X	[ĥ]	600
Ө	700	oto	Ɔ	[o]	800
У	900	cio	Ц	[c]	900
Ѕ	1000	ĉervo	Ч	[ĉ]	<b>90</b>
Ш		ŝa	Ш	[ŝ]	
Щ	<b>800</b>	ŝta	Щ	[ŝt]	
Љ		jerego	Ъ	[ǒ] <sup>12</sup>	
Ў		jerio	Ы	[i]	
Ѓ		jereto	Ь	[ĭ]	
А		jato	Ъ	[æ]	
Р		juko	Ю	[ju], [’u]	
		jazo	Я	[ja], [’a]	
		jesto	Є	[je], [’e]	
€		useto	А	[ĕ]	
Ɔ€		juseto	Я	[jĕ], [’ĕ]	
Ѓ€		usego	Ж	[ĵ]	
Ѓ€		jusego	ИЖ	[jĵ], [’ĵ]	
		psi	Ψ	[ps]	
		ksi	Ѓ	[ks]	

[12] Jerego sonis kiel mallongega vokalo, supozeble artikulaciata inter [u] kaj [o]. Lingvistoj ofte latinigas ĝin per <ŭ>, tamen en esperanta teksto tio estus konfuza; tial ni uzos la latinigon <ǒ>, tiom pli volonte, ke ĝi donas oportunajn esperantigojn; ekz-e АЗЪ [azǒ] → azo. Kaj ruse la jeregoj kiuj ne tute mutiĝis iĝis /o/: сѣнь → сон.

Ⲑ		tito	ϑ	[t] / [f]	9
ⲑ		iĵico	ϕ	[i], [v]	400

Oni vidas el la tabelo, ke la literojn oni ankaŭ uzis en la rolo de ciferoj, laŭ la maniero hebrea-greka. Ĉe tio Kirilico laŭeble konformiĝas al la cifervaloroj de la literoj pruntitaj el la greka, tiel ke la valoron 2 havas *vedo* В (la 3<sup>a</sup> litero, identa al beto), dum la 2<sup>a</sup> litero *buko* Б (aldonita) ciferan valoron ne havas. Glagolico estas pli aŭtonoma. Tio similas la heziton de esperantistoj, kiuj



Fig. 1: Suzdala turhorloĝo kun kirilica ciferplato. Bildo el [Wikimedia Commons](#).

iam numeras erojn en listo jen «glagolicece» per *a, b, c, ĉ...*, jen «kirilicece» per *a, b, c, d...*

## Noto pri la literonomoj

Historie en ambaŭ samstrukturaj slavonaj alfabetoj estis uzataj unuj samaj literonomoj, kaj en la ĉi-supra tabelo mi provis ilin esperantigi. Tamen ne evidentas, ĉu tio estas racia maniero esperantigi.

En la landoj uzantaj cirilajn alfabetojn oni jam delonge forlasis la tradiciajn slavonajn literonomojn, kaj nomas la literojn laŭ la okcidenta maniero — kp la literonomojn unikodajn:

0410 cyrillic capital letter **a**; (A)

0411 cyrillic capital letter **be**; (B)

0412 cyrillic capital letter **ve**; (B)

Nur por kelkaj literoj malhavantaj latinalfabetan respondejaŭon Unikodo uzas nomojn slavonajn, ekz-e:

0448 cyrillic small letter **sha** (Ш)

0449 cyrillic small letter **shcha** (Щ)

044b cyrillic small letter {yeru|**yeri**} (Ы)

En Esperanto ni povas pli regule diri «cirila ŝo» (kaj «cirilaj co, ĉo, ĥo, ĵo»); sed *ŝta*, *jeroj* kaj *jerio* prefere konservu siajn (adaptitajn) nomojn slavonajn. Krome, estas ankoraŭ pluraj pli malfacilaj problemoj pri la nomoj de la modernaj literoj cirilaj, sed ĉi tie ni restu en la kadro de la alfabetoj slavonaj.

Kirilico entenas kelkajn literojn superfluajn, enkondukitajn por skribi grekaĵojn. En Esperanto konvenus uzi iliajn nomojn grekalfabetajn (laŭbezone kun la epiteto «cirila»): «cirilaj *omego*, *psi*, *ksi*, *teto*, *upsilo*». (Eble ankaŭ «cirilaj gamo, kapo, pi,

roto, taŭ, fi» estus pli klaraj — sed ankaŭ tiam B restu «cirila vo», ĉar la mezgreka sonvaloro de beto ne estas kutima inter la esperantistoj.)

Alie statas la afero pri la liternomoj glagolicaj. Ili estas malpli vaste uzataj, kaj ilin oni plu preferas nomi per la nomoj slavonaj. Tiel ilin nomas Unikodo:

2c00	glagolitic capital letter <b>azu</b>	ⴐ
2c01	glagolitic capital letter <b>buky</b>	ⴑ
2c02	glagolitic capital letter <b>vede</b>	ⴒ
2c03	glagolitic capital letter <b>glagoli</b>	ⴓ
2c04	glagolitic capital letter <b>dobro</b>	ⴔ

## Argumentoj

La kutima rezonado pri la ordo de estiĝo de la slavonaj alfabetoj estas proksimume tia:

- La unuan alfabeton kreis Konstanteno-Cirilo.
  - Glagolico estas pli frua ol Kirilico.
  - Preskaŭ ĉie Kirilico forpuŝis Glagolicon.
- 
- **Sekve**, Konstanteno-Cirilo inventis Glagolicon, kaj iam poste, en Bulgarujo, okazis la *Preslava reformo* el kiu estiĝis la grekeca Kirilico.

Ĉio ĉi *ŝajnas* logika kaj solida. La fontoj parolas pri sankta Cirilo kiel pri la inventinto. La lingvaĵo de la manuskriptoj glagolicaj estas pli arkaika ol tiu de la kompareblaj skribaĵoj Ki-

rilicaj; oni trovas tekstojn Kirilicajn skribitajn sur forviŝita teksto glagolica, neniam inverse. Kaj nur la kroatoj retenis Glagolicon por kultaj tekstoj.



Fig. 2: Glagolica peco el la Rejmsa Evangelio.

Bildo el [Wikimedia Commons](#).

Verdire, krom la kroatoj glagolicaĵon uzis ankaŭ la francaj reĝoj: dum sia kronado ili ĵuris sur *Rejmsa evangelio*, atribuata al sankta Hieronimo el Stridono, la tradukinto de Vulgato. Nur Petro la Granda, dum sia vizito en Francion (1717), unua konstatis (mi imagas, kiom mirigite!), ke la Rejmsa evangelio estas en Slavono, skribita parte Glagolice, parte Kirilice.

Ĉu ne estas tamen iom stranga ke, fidele konservinte Glagolicon, la kroatoj tamen persiste, almenaŭ ekde la 12<sup>a</sup> jc, atribuis ĝin ne al sankta Cirilo, sed al sankta Hieronimo?



Tio ne estas grava objekto; sed du aliaj aferoj, neformalaj kaj malfacile pruveblaj, precipe malhelpas min akcepti la regantan teorion.

*Unue*, nenio en la karaktero kaj biografio de Konstanteno-Cirilo lasas suspekti kontraŭgrekan (aŭ kontraŭlatinan) tendencon.

Kaj *due*, la arta stilo de Glagolico ŝajnas aparteni al tute alia, pli frua epoko (fakte, ĝuste al la epoko de Hieronimo el Stridono).

Ni konsideru tiojn iom pli detale.

## Duonjarmilon antaŭ Renesanco

Veninte Reĝurbon<sup>13</sup>, Konstanteno komencis studojn ĉe la profesoroj. En 3 monatoj li ellernis la tutan gramatikon, tradudis Homeron, geometrion kaj dialektikon ĉe Leono kaj Fotio, kaj ĉiujn filozofiajn teoriojn, kaj krome retorikon, aritmetikon, astronomion, muzikon kaj ĉiujn ceterajn sciojn grekajn. Li ellernis ilin kiel neniu alia, ĉar en li la komprenemon plifortigis la diligento, kaj ili sin interhelpis, per kio perfektigis la sciencoj kaj artoj [VK, ĉap. 4].

Konstanteno ne povus trovi pli klerajn instruistojn.

*Leono* (Λέων) la Matematikisto tiel famiĝis per siaj disĉiploj, ke ĥalifo Mamuno<sup>14</sup> sendis al imperiestro Teofilo specialan

---

[13] **Reĝurbo**: Unu el pluraj nomoj de Konstantinopolo, la ĉefa en Slavono (Цѣсарьградъ, laŭ la greka Βασιλις Πόλις).

[14] Abd-Allah al-Mamun, filo de Harun ar-Raŝid kaj ĥalifo (813-833) estis klerulo kaj granda mecenato de sciencoj. Ĉe lia kortego ver-

leteron, proponante preskaŭ tunon da oro pro permeso dum nelonga tempo gastigi Leonon en Bagdado (Teofilo rifuzis). Kvankam liaj verkoj nin ne atingis, tradicio asertas ke li inventis lumtelegrafon kaj simpliginte la matematikan notacion de Diofanto, ekuzis la literajn simbolojn  $\alpha'$ ,  $\beta'$ ,  $\gamma'$ ,  $\delta'$  en algebro — kiel faros Vieto<sup>15</sup> (kun literoj latinaj) 7 jarcentojn poste.

*Fotio* (Φώτιος) estis la plej brila reprezentanto de tiu parto de la bizancia intelektularo, kiu volis harmoniigi la rilatojn inter la profana scienco kaj teologio kaj deklaris ke la klasika heredaĵo (precipe la filologia) ebligas pli bone kompreni la superan saĝon.

El la verkoj de Fotio unu restas precipe valora fonto por la scienco. Posedanto de granda biblioteko, Fotio faris referaĵojn pri la legataj libroj — religiaj kaj profanaj, paganaj kaj kristanaj. Tiel lia «Libromiriado» (Μυριοβιβλίον; fakte temas pri 280 verkoj) konservis informojn pri tio, kion enhavis verkoj poste perditaj — kaj eĉ pri tio, kio mankis en verkoj konservitaj (sed estas enŝovita en la tekstojn kiuj nin atingis).

Cetere, Fotio estis eminenta teologo, en kies verkoj neniu lia kontraŭulo trovis dogman eraron.

---

kis mia granda sampatrujano Muhamado la Ĥorezmano; la alnomo de tiu lasta (al-Ĥorezmi), misformita per latinigo, plu vivas en la scienca termino *algoritmo*, kaj la komenca vorto *al-ĝabr* el la titolo de lia traktaĵo (cetere, dediĉita al Mamuno) iĝis nomo de *algebro*.

[15] Latine *Franciscus Vieta*, france *François Viète* (1540–1603).

Interesan ekzemplon pri la etoso de tiu klerisma rondeto prezentas letero de Fotio al Leono. Leono kritikis la stilon de la Nova Testamento, kaj metis la elokventon de la klasikaj oratoroj super tiun de apostolo Paŭlo; responde Fotio defendis la literaturan valoron de la Bibliaj tekstoj. La opinioj mem ne estas tre originalaj, sed interesaj estas la toleremo kaj la libero de opinioj, kiajn oni ne esperus renkonti en la 9<sup>a</sup> jc — precipe konsidere ke Leono estis tesalonika eksmetropolito (li perdisian katedron post la malvenko de la ikonrompistoj en la jaro 843<sup>a</sup>), kaj Fotio estis onta patriarko Nov-Roma.

Unu el la argumentoj de Fotio en lia polemiko kontraŭ la ikonrompistoj similas postan argumenton de Konstanteno-Cirilo. Ikonrompistoj indikis, ke diversnaciaj pentristoj prezentas Kriston tute malsame, kaj sekve tiuj prezentoj malvalidigas unu la aliajn. Fotio respondis, ke ankaŭ Evangelio ekzistas en diverslingvaj tradukoj, en tute malsamaj *literoj kaj sonoj* — etio-paj, hebreaj, hindaj, latinaj — sed tio neniom malebligas al ili esti diinspiritaj.

Ĉiel ajn, la citita fragmento el VK pruvas ke nek la disĉiplo de Konstanteno ĝin verkinta, nek la profesoroj de Konstanteno iel malŝatis «la grekajn sciojn».

## Misiistaj alfabetoj kaj 𐌆𐌇𐌈𐌉𐌊𐌋𐌌𐌍𐌎𐌏𐌐

La malsimilo inter la literoj grekaj kaj glagolicaj estas okulfrapa, sed sciencistoj venkis la evidenton kaj trovis iujn

subtilajn similaĵojn. Ankoraŭ unu atesto pri tio, ke per sufiĉe forta streĉo eblas «science» pruvi ĉion ajn.

Pli ol la skribon grekan, la dizajno de Glagolico similas la etiopan, aŭ la eklezian kartvelan, aŭ la skribon kiun Sekvojo elpensis por sia irokeza tribo ĉerokio. Kurioza ekzemplo: en 1929, dum alŝtatigo de la kolektoj de akad. N.P. Liĥaĉov, prof. A.S. Orlov erare klasis pergamenan psalmaron *etiopan* kiel manuskripton *glagolican* [[Pr](#), pĝ 190].

Endas tuj klarigi ke temas nur pri la grafikaj elementoj, neniel pri ilia fonetika signifo. Ekz-e pluraj menciitaj alfabetoj havas krucforman literon, kiel la kopta **Ⲛ**; sed en Glagolico ĝi signas la vokalon [a], dum en la eklezia kartvela, la konsonant-  
on [k´].

Klare, la sortimento da simplaj grafikaj elementoj estas negranda kaj tial koincidoj en ilia kombino estas tre probablaj (kion pruvas la ĉerokia skribo, kies kreinto nenion sciis pri Glagolico kaj eĉ ne scipovis legi la anglan). Tamen kelkaj elekt-  
oj evidente estas ideologie motivitaj: en la kartvela alfabeto eklezia la krucforma litero *kan* estas la unua de la vorto *Kriste* (Kristo); en Glagolico **Ⲛ** malfermas la alfabeton.

Komencante novan aferon, piulo antaŭ ĉio sin krucosignas. Tiu kutimo ĝis nun vivas en la tuta Ortodoksujo: per krucosig-  
no komencis sian laboron greka monaĥo kiun mi petis kopii por mi skribaĵon en la Sankta Tombo en Jerusalemo. De la kruco komenciĝas la studo de la skribo glagolica.

Ankaŭ aliaj figuroj havas simbolan valoron: cirklo (la eterno; kp la Zamenhofan *Eternulo*), triangulo (la Triunuo). Simetriaĵ kombinoj de tiaj figuroj formas gravajn mallongigojn; ekz-e ĪC (tradicia mallongigo por Ἰησῦς = *Jesuo*) iĝas ⱮⱮ. Aŭ ekz-e [Apokalipso 1:8]

|| Mi estas † kaj Ɱ, diras la Sinjoro.

Tre probable, ke tiaj simbolaj konsideroj, similaj al la ideoj de aŭtoroj de *aprioraj* lingvoprojektoj, influis la kreinton de Glagolico. Tamen ne ĉiujn literojn tio koncernas, kaj krome, tio neniel klarigas lian evidentan decidon eviti ĉion ajn similan al la alfabetoj greka aŭ latina.

Nu, tia tendenco ja ekzistis en la frua kristanisma epoko, kiam estiĝis la skriboj stile similaj al Glagolico kaj kiam ĉio klasika estis perceptata kiel paganaĵo. Tamen post Justiniano la Unua la klasika paganismo ne plu estis atentinda rivalo, ĝian lokon okupis la herezoj; anstataŭe, kontraŭklasika malamo estas atestita, ekz-e, inter la egiptaj, siriaj, armenaj monofizitoj. Tamen neniu riproĉis tian herezon al la tesalonikaj fratoj. Do, ĉu troveblas alia spuro kelkcent jarojn pli frue?

## Cirilo la Filozofo

Cirilo naskiĝis en Kapadokio, okcidenten de Armenujo. Fininte siajn studojn en Damasko li venis Aleksandriion.

Foje en la katedralo de la granda papo Aleksandria li aŭdis voĉon el la altarejo, kiu lin vokis:

— Cirilo!

kaj ordonis ke li iru en la landon vastan, «en la naciojn slavajn, alinome bulgarajn», por kredigi ilin kaj instrui al ili la Leĝon.

Cirilo konsterniĝis, ĉar li ne sciis, kie situas la lando slava alinome bulgara. Li iris Kipron, sed ankaŭ tie neniu aŭdis pri la slavoĵoj. Post tiu malsukceso li jam estis revenonta Aleksandrion, sed ekpensis pri profeto Jona kaj ŝipiris plu, al Kreto, kie li ricevis konsilon iri Tesalonikon.

En Tesaloniko Cirilo vizitis metropoliton Johanon kaj informis lin pri sia misio. Johano respondis, ke Cirilo estas freneza maljunulo, ke la bulgaroj estas homvoruloj kiuj certe lin formanĝos.

En la bazaro Cirilo hazarde aŭdis slavan parolon kaj teruriĝis. Fine lin helpis miraklo.

Foje, elirinte el kirko post dimanĉa diservo, sidiĝinte «sur la marmoron, enpena kaj malĝoja», li subite ekvidis korvon kun ligaĵo en la beko. La korvo ĵetis la ligaĵon al Cirilo sur la baskonon, li nombris la ligitajn objektojn; ili estis 32. Cirilo metis ilin ĉebrusten, kaj iris al la metropolito por montri al li ilin. Sed la objektoj mirakle malaperis en lia korpo, kaj krome, Cirilo subite mallernis la grekan lingvon.

La metropolito sendis por inviti Cirilon, sed tiu ne komprenis la senditon. Finfine Cirilo iĝis malliberigita.

Perdinte la grekan, Cirilo mirakle ricevis scion de la lingvo kaj skribo slavaj. Informite pri tio, la bulgaroj kun siaj princoj Desmiro de Moravio kaj Radivojo de Preslavo sieĝis Tesalonikon postulante:

— Transdonu al ni la homon kiun Dio sendis al ni!

Post 3 jaroj da sieĝo la metropolito liberigis Cirilon kaj lin transdonis al la bulgaroj. Akceptinte Cirilon «kun granda ĝojo», la bulgaroj lin kondukis en la urbon Raveno *ĉe rivero Bregalnico*, kaj tie Cirilo instruis al ili la literojn kaj kristanisman.

## La fabelo kaj la realo

La ĵusa rakonto (*La tesalonika legendo*, Слово Кырила Философа како увѣри Боулгаре,<sup>16</sup>) entenas evidentajn anakronismojn kaj fabelaĵojn, sed ankaŭ tre rekoneblajn trajtojn historiajn: la metropolito estas Johano la Dua, partoprenanto de 6<sup>a</sup> Ekumena Koncilio (681–682); kaj en 675–678 tri slavaj triboj efektive sieĝis Tesalonikon, kion ni scias el verko de la metropolito mem (cetere, ĝi ne mencias Cirilon la Kapadokianon).

Tamen tiam la prabulgaroj ankoraŭ ne asimiliĝis inter la slavoĵoj, ili eĉ ankoraŭ ne transiris Danubon.

La malhelpemon de la metropolito facile klarigas la deveno de Cirilo. Naskita kaj edukita en regionoj monofizitaj, li probable mem estis monofizito, kaj la ortodoksulo Johano ne povis aprobi herezan mision.

Tiaj malsimpatioj kutime estas reciprokaj kaj etendiĝas al ĉiaj rilatoj interkulturaj; tio povus klarigi la malakcepton de la

---

[16] Ekz-e en: Б. Ангелов. Солунската легенда // Из старата българска, руска и сърбска литература. Т. 2. София, 1967.— С. 63–66.

greka lingvo, kiun Cirilo «mallernis». Kaj ĝuste Glagolicon aŭ ion similan kreus tia homo, malŝatanta «la preciozan, lispan kaj manieran lingvon grekan» (laŭ diro de armena aŭtoro). Ĝuste pro tia malamo kvar jardekojn antaŭe Egiptujo kaj Palestino tiom facile akceptis la araban konkeron.

Kaj interese, la «mallonga» *Vivo* de Konstanteno-Cirilo ial speciale mencias, ke antaŭ sia misio en Moravion li trovis ĉe *Bregalnico* baptitajn slavojn.

## Ĉu hazarda koincido?

Tradicie oni vidis en «La tesalonika legendo» fantazian popolan fabelon pri **Konstanteno la Filozofo**. Tamen malgraŭ la fabelaj detaloj ĝi entenas la historian fonon de tute alia epoko. La legendo ne sufiĉas por pruvi historian ekziston de **Cirilo la Filozofo**; sed ĝi sugestas, kiel Glagolico povis estiĝi.

Kompreneble ĝia herezula deveno ne estus bonvena en la postaj jarcentoj; kaj ĉar la tradicio firme ligis *Cirilon* al *Kirilico*, la kroatoj trovis pli respektindan aŭtoron en la persono de sia samlandano Eŭzebio Hieronimo Sofronio el la dalmata urbo Stridono.

Ŝajnas ke Konstanteno-Cirilo estis pli honesta. Li estis disĉiplo de Fotio, kiu en sia letero al Boriso-Miĥaelo, iom neatendite por patriarko skribanta al ĵusbaptita ĥano, indikis ke la herezoj utilas por klarigi la veron, ĉar nekontestata vero falsiĝas (kp *1Kor* 11:19; la posta historio pruvis, ke la bulgaroj



sekvis la konsilon). En la teksto rekonstruita de *A. Vaillan*<sup>17</sup> kiel antaŭparolo de Konstanteno-Cirilo al lia traduko de la Skriboj estas nemalsimila deklaro: la tradukinto profitis la tradukojn de herezuloj siriaj «ĉar, kiel diris sankta Cirilo,<sup>18</sup> ne ĉio kion faras miskredantoj estas evitenda kaj forĵetenda».

Eble estas nura hazardo ke Konstanteno monaĥiĝis sub la nomo Cirilo. Sed eble li tiel omaĝis sian antaŭulon, kies laboron li uzis por krei Kirilicon?

---

[17] Voĉlegu [vajã], aŭ (en esperanta aproksimo) *Vajan'*.

[18] Ĉi tiu **sankta Cirilo** estas ankoraŭ unu, jam tria *Cirilo* en nia rakonto. Temas pri Aleksandria papo (412-444), kontraŭulo de Johano la Orbuŝa kaj precipe de Nestorio.

# La trilingva herezo

... Kiam Konstanteno estis en Venecio, kunvenis kontraŭ lin la latinaj episkopoj, monaĥoj kaj pastroj, kaj levis la trilingvan herezon dirante:

— Kiel aŭdacis vi krei skribon por la slavoj kaj instrui ĝin al ili, ĝin kiun neniu antaŭe inventis: nek apostolo, nek papo; nek Gregorio la Dialoga,<sup>19</sup> nek Hieronimo, nek Aŭgusteno? Ni konas nur tri lingvojn, en kiuj Dio per specialaj skriboj estu glorata: la hebrean, la grekan kaj Latinon ... [VK, ĉap. 16<sup>a</sup>]

En diversaj epokoj oni prezentis diversajn argumentojn favore al koncernaj «sanktaj lingvoj».

## La lingvo de Adamo

«Sur la tuta tero estis nur unu lingvo kaj unu parolmaniero», asertas Biblio [Gen 11:1]. Kaj baldaŭ post la Diluvo la homaro volis konstrui por si urbon kaj tie turon, specon de ĉiela ŝtuparo songota de Jakobo [Gen 28:12].

Nun nuboskrapaj konstruaĵoj estas afero ordinara, sed tiam la ideo tiom ŝokis la Eternulon, ke li konfuzis la lingvojn.

Tamen unu familio, la Arpaĥŝadidoj, dizertis la publikan laboron. *Arpaĥŝado* estis filo de Ŝemo, unu el liaj pranepoj ricevis la nomon *Pelego*, «ĉar dum lia vivo dividiĝis la tero»

---

[19] **Gregorio la Dialoga**: papo de Romo s-ta Gregorio la Granda (590–604), aŭtoro de 4 «Dialogoj» pri Italiaj miraklofarintoj. La epiteton *Dialoga* (Двоесловъ) li havas en la slavona sanktulnomaro.

[Gen 10:25]. El la genealogio [Gen 11:10–18] kalkuleblas, ke Pelego vivis en la jaroj 102<sup>a</sup>–341<sup>a</sup> post la Diluvo.

Tial la Arpaĥadidoj konservis pura kaj nedifektita la pralingvon de Adamo kaj Noaĥo, la lingvon en kiu la Sankta Skribo estas rivelita. Abrahamo estis pra-pra-pra-nepo de Pelego kaj dum la unuaj 140 jaroj de sia vivo povis aŭdi la antaŭdiluvan lingvon rekte el la buŝo de sia praulo Ŝemo, aĝanta 460 jarojn kiam *Abram*' naskiĝis.

Verdire, se la Biblia mito celis ekspliki la devenon de la lingvoj, ĝi tamen fiaskis pri la franca, rusa aŭ Esperanto. Eĉ pli malbone, ni ne scias kiuj el la Abrahamidoj konservis pli puran pralingvon: ĉu la araboj posteuloj de la pli aĝa filo Iŝmaelo (la Nobla Korano ja estis rivelita «en la klara araba lingvo»), aŭ la Izraelidoj posteuloj de Isaako? La lingvistoj ĝenerale konsentas, ke la klasika araba estas pli arkaika ol la klasika hebrea (kelkaj propraj nomoj Bibliaj konservis finaĵojn perditajn de la hebrea, kiujn la masoristoj ne sukcesis tute forredakti).

La nunan lingvopolitikon de la Sinjoro karakterizas la Pentekosta plurlingveco, kies specimenojn regule prezentas Johano Paŭlo la Dua. Tamen en «la lastaj tempoj» la homaro sendube retrovos «la puran lingvon», kvankam ĉe cirkonstancoj infere malesperigaj [*Cefanja* 3:8–9]:

|| Tial atendu min, diras la Eternulo, ĝis mi miatempe leviĝos; ĉar mi decidis kolekti la naciojn, kunvenigi la regnojn, por elverŝi sur ilin mian koleron, la tutan flamon de mia indigno; ĉar de la fajro de mia severeco forbrulos la tuta tero. *Tiam mi*

*redonos al la popoloj lingvon puran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo kaj servadu al li unuanime.*

## El letero de Aristeo

... Demetrio el Falero, la estro de la reĝa biblioteko, ricevadis multe da mono por kolekti, kiom li povis, ĉiajn librojn de la mondo por Ptolemeo la reĝo de Egiptujo, granda libroŝatanto. Foje la reĝo lin demandis en mia ĉeesto:

— Kiom da libroj jam estas en la biblioteko?

— Pli ol ducent mil, ho reĝo, — respondis Demetrio, — sed mi esperas baldaŭ kolekti la reston, tiel ke estos pli ol kvincent mil. Alvorte, mi aŭdis, ke la Leĝo de la judoj estas kopiinda kaj meritas lokon en via biblioteko.

— Kio do vin malhelpas aranĝi tion? — demandis la reĝo. — Vi havas ja ĉiujn rimedojn.

— Necesas traduki ilin. Ĉar en sia lando la judoj parolas apartan lingvon. Oni ofte konfuzas ĝin kun la aramea, sed ĝi estas alia.

La reĝo komprenis la aferon kaj ordonis prepari leteron al la ĉefpastro de la judoj (...) Ĝi tekstis jene:

Reĝo Ptolemeo salutas ĉefpastron Eleazaro (...)

Dezirante montri mian aprezon al ĉiuj judoj de la mondo kaj de la venontaj generacioj, mi decidis ke via Leĝo estu tradukita el via lingvo hebrea en la grekan, por meti tiujn librojn en mian bibliotekon.

Tial vi faros bone se vi elektos po ses maljunulojn el ĉiuj triboj viaj, homojn piajn en la vivo kaj spertajn en la Leĝo, kapablajn

precize ĝin traduki.

Mi sendas mian gvardiestron Andreo kaj Aristeon, homojn tre estimindajn, por prezenti al vi la aferon kaj cent talantojn da arĝento (...)

Vi faros al mi komplezon se vi sciigos, kion vi deziras.

Je tio Eleazaro konvene respondis:

Ĉefpastro Eleazaro salutas reĝon Ptolemeo.

Akceptu miajn bondezirojn por vi, por reĝino Arsinoo (Ἀρσινόη) via fratino, kaj por viaj idoj (...)

Ni faros laŭ via deziro — kvankam ĝi estas nekutima — ĉar vi faris por ni multajn kaj eksterordinarajn favorojn. Antaŭ la tuta popolo mi elektis po ses maljunulojn el ĉiu tribo, kaj mi sendas ilin al vi kun kopio de nia Leĝo.

Estus afablaĵo, ho justa reĝo, se vi ordonos ke post la plenumo de la traduko la homoj estu tuj sekure al ni revenigitaj.

... Tri tagojn post la veno de la saĝuloj Demetrio akompanis ilin en la Nordan distrikton de Faroso. Li loĝigis ilin en aparta domo sur la marbordo, izolita kaj trankvila, tre konvena por sciencaj studoj. Tie ili laboris, akordigante siajn tradukojn, kaj ĉio interkonsentita estis konvene skribata sub la redakto de Demetrio...

(La reĝo Ptolemeo Filadelfo regis Egiptujon ekde la jaro 5225<sup>a</sup> de mondo (t.e. 284/285 a.K.); Demetrio el Falero mortis baldaŭ post 283 a.K. La «Letero de Aristeo» estis referencita jam en la 2<sup>a</sup> jc a.K., kaj Jozefo Flavio resumis ĝin sur 10 paĝoj en siaj «Antikvaĵoj judaj», libro 12<sup>a</sup>, ĉap. 2<sup>a</sup>. Post kelkaj jarcentoj Talmudo donis sian version de tiu fabelo en la Rulo 9<sup>a</sup>.)

## La versio talmuda

Reĝo Ptolemeo kunvenigis 72 maljunulojn. Li lokis ilin en 72 ĉambrojn, ĉiun aparte, sen diri kial li ilin venigis. Li eniris la ĉambron de ĉiu kaj diris:

— Skribu por mi Toraon de Moŝeo via majstro.

Dio metis en la koron de ĉiu kiel traduki idente al ĉiuj ceteraj.

Tiu estis malĝoja tago, kiel klarigas la saĝuloj en *Megilat Ta'anit*:

Je la 8<sup>a</sup> de Tebet', kiam Torao iĝis tradukita en la grekan sub reĝo Ptolemeo, mallumo falis sur la mondon kaj daŭris tri tagojn. Kion tio similis? Leonon enkaĝigitan. Antaŭ la kaptiteco ĉiuj ĝin timis kaj de ĝi fuĝis. Kaj nun ĉiuj venis ĝin rigardi kaj diris:

— Kie do estas ĝia forto?

## La kulturlingvo de la klasika epoko

Iel ajn, la greka lingvo posedis diinspiritajn librojn de la Malnova kaj de la Nova Testamentoj. Tio estis ĝia ĉefa merito en la opinio de la kristanoj mezepokaj, pri kiuj temas en nia eseo.

Evidente, la greka posedis ankaŭ pli bonkvalitajn kulturajn valorojn sciencajn, filozofiajn, literaturajn, teatrajn... Nin atingis nur malgranda ono kiun bonvolis konservi la generacioj mezepokaj.

## La kulturlingvo de la «Sovaĝa Okcidento»

Sian karieron de kulturlingvo Latino faris jam postmorte, post la barbara konkero.

En la klasika Romio la tuta filozofio kaj scienco estis greklingvaj. Latino havis relative modestan kolekton da bonkvalita poezio, en kelkaj ĝenroj kompareblan kun ties helenisma modelo; eminentajn (kvankam tre memcentrajn) verkojn politikajn, jurajn, militajn, satirajn kaj historiajn. La teatron anstataŭis pantomimo kaj cirko. Cicerono, Lukrecio, Seneko provis verki en la ĝenro filozofia, sed tiuj verkoj apartenas pli al la latina filologio ol al originala filozofio. La lingvaĵo metafizika restis subevoluinta (proksimume kiel la faka terminaro de Esperanto), kaj eĉ grandaj ŝatantoj de Latino (ekz-e Marko Aŭrelio) verkis en la greka por esprimi delikatajn pensonuancojn.

Kontraŭekzemplon prezentas la *Historio* Romia de Amiano Marceleno: kvankam denaska greklingvano, li tamen preferis verki ĝin latine.

Post la barbara konkero la scio de la greka iĝis rara, kaj kun ĝi perdiĝis la pli granda parto de la kulturo. El ĉiuj verkoj de Platono, en Latino ekzistis nur *Timeo*; tial Boecio, *la lasta romiano*, decidis traduki por siaj samlingvanoj la verkojn de Platono kaj Aristotelo. Li sukcesis traduki nur kelkajn verkojn logikajn de Aristotelo; verkojn de Platono li eĉ ne komencis

[20] En la jaro 524/525; tiel Teodoriko perdis sian reputacion de

liaj tradukoj restis la plej serioza parto de tio, kion la Okcidento heredis de la antikveco (la «malnova logiko»).

Do, restis nemulte, kaj la lingvo mem restis subevoluinta.<sup>21</sup>

La skolastiko komenciĝos de tie, kie interrompiĝis la laboro de Boecio. Sed kurioze, la okcidentanoj preferos traduki el alia kulturlingvo (la araba). Du-tri jarcentojn post la epoko, kie estas ankrita nia eseo, la okcidenta skolastiko leviĝos ĝis la nivelo de la bizancia kaj araba; sed dume inter ili estas abismo, kaj Miĥaelo la Tria (la imperiestro de la romianoj) responde al la pretendoj de papo Nikolao la Unua de Romo nomos la rigidan kaj malriĉan Latinon «lingvo barbara kaj skita».

---

klera monarko, kaj papo Gregorio la Granda mencias en siaj «Dialogoj», ke kamparano vidis la animon de la reĝo ĵetata en krateron de vulkano.

[21] G. Waringhien skribas pri la Nicea-Konstantinopola kredkonfeso [*Ni kaj Ĝi* (Eseoj III). La Laguna: Stafeto, 1972, pĝ 189–190]:

La situacio eĉ komplikiĝis, kiam la Roma eklezio trovis sin antaŭ la tasko esprimi tiajn araneecajn nociojn en la malsubtila latina lingvo. La normala traduko de οὐσία estus *essentia* (ambaŭ vortoj havas en ĉiu lingvo la saman rilaton al la verbo «esti»); sed probable tiu «esenco» ŝajnis tro vaporiĝema al la realistaj Romanoj, kaj ili preferis al ĝi la pli sukan *substantia*; sed tiam ili troviĝis senrimedaj antaŭ ὑπόστασις, al kiu ĝuste *substantia* respondis, vortero laŭ vortero. Aŭgusteno proponis anstataŭe *persona* (kiu propre signifis: teatra masko), sed li ne devis senti pri tio perfektan kontentecon, ĉar, en la fino de kvinlibra traktato, li konfesis, ke oni parolas pri tri personoj, ne por signifi ion, sed por ne resti tute silenta.

La mistradukon «samsubstanca» (anstataŭ «samesenca», slavone единосущный) Latino heredigis al Esperanto — aŭ, almenaŭ, al PIV kaj al la romkatolika traduko de la Kredkonfeso.



# Pilatismo

Do, en la Oriento estis multe da kulturaj lingvoj, multe da urbegoj kristanaj kaj kvar patriarkoj; en la Okcidento estis nur po unu da ili. Kaj malgraŭ tiu monopolo la pozicio de Latino estis iom malforta.

Ŝajnas ke Izidoro de Sevilto (m. 636) unua proklamis Latinon «sankta lingvo»; en siaj *Etimologioj* li pruve citis Evangelion [Jn 19:19–20]:

Kaj Pilato ankaŭ skribis titolon, kaj surmetis ĝin sur la krucon. Kaj estis skribite: *Jesuo Nazareta, la reĝo de la judoj*.

Tiun titolon multaj el la Judoj legis; ĉar la loko, kie Jesuo estis krucumita, estis proksime de la urbo; kaj ĝi estis skribita Hebreo kaj Latine kaj Greke.<sup>22</sup>

ישוע הנצרת מלך היהודים

IESVS NAZARENVS REX IVDÆORVM

ΙΗΣΟΥΣ Ο ΝΑΖΩΡΑΙΟΣ Ο ΒΑΣΙΛΕΥΣ ΤΩΝ ΙΟΥΔΑΙΩΝ

El tio Romo konkludis, ke nur la tri menciitaj lingvoj konvenas por publike glori Dion. Rezonado nerefutebla ĉar tute eksterlogika: unu fojon iu uzis Latinon en kompanio kun la greka kaj aramea por publike ironii pri Jesuo — sekve ankaŭ Latino estas ekskluzive konvena por la celoj liturgiaj.

---

[22] La Londona Biblio donas ĉi tie la okcidentan ordon: *Hebreo, Latine, Greke*; en la ortodoksaj eldonoj de la greka teksto la ordo estas: *Hebreo, Greke, Latine* ([komparu](#)).

Tamen Konstanteno-Cirilo trovis respondojn.

Unue, li tre trafe nomis siajn oponentojn «pilatanoj»<sup>23</sup>.

Kaj due, li trovis ankaŭ pli subtilan argumenton, tre dialektike turninte la diron de Paŭlo [1Kor 14:6-16]:

Sed nun, fratoj, se mi venus al vi, parolante per [nekompreneblaj] lingvoj, kiel mi vin helpus, se mi ne parolus al vi, aŭ en formo de malkaŝado, aŭ de sciado, aŭ de profetado, aŭ de instruado? ... Tiel ankaŭ vi, se vi per la lango ne donas parolon facile kompreneblan, kiel oni scios, kio estas parolata? ĉar en la aeron vi parolus. Eble estas tiom da specoj de voĉoj en la mondo, kaj nenia estas sensignifa. Se do mi ne scios la signifon de la voĉo, mi estos, rilate la parolanton, barbaro, kaj la parolanto estos por mi barbaro. Tiel same ankaŭ vi ... klopodu, ke vi havu abunde por la edifo de la eklezio ... Alie, se vi benas spirite, kiamaniere tiu, kiu okupas la lokon de la malklerulo, diros *Amen* ĉe via dankesprimo? ĉar li ne scias, kion vi diras...

Efektive, latina (aŭ greklingva, aŭ hebrea) meso antaŭ slavo estus egale sensenca, kiel slavona glosolalio antaŭ korintanoj.

## Pri Slavono

Laŭ PIV, Slavono estas «religia lingvo, devenanta el la malnova bulgara, kaj uzata de la rusortodoksaj eklezioj».

---

[23] **pilatanoj**: Ĉu hazarda koincido ke en «La majstro kaj Margarita» la majstro estas akuzata pri «fi-pilatismo»? Ĉu kaŝita cito fare de Bulgakov?

Tio estas proksimume tiom (mal)ĝusta kiel diri ke «Latino estas religia lingvo, devenanta el Latio, kaj uzata de la rom-katolikaj eklezioj» (hm, la PIV-a difino efektive estas proksimume tia!).

Dum almenaŭ sep jarcentoj Slavono estis la literatura lingvo de la ortodoksaj slavoĵ kaj rumanoĵ. Pro la reganta moro de la epoko ĝi estis precipe uzata por la tekstoj religiaĵ; sed ankaŭ por verkoj historiaĵ, beletraĵ, enciklopediaĵ. Ĉiuj tradukoj estis farataj en Slavonon. Ĝi rolis ankaŭ kiel lingvo diplomatia.

Ekzemple dum kelka tempo post la falo de Konstantinopolo, kiam pri la alilandaj aferoj en la turka registaro responsis bulgarioĵ, la traktatoj inter Venecio kaj Istanbulo estis skribataj en Slavono.

Estas vera ke Slavono havas multajn trajtojn de la malnovaj bulgara-makedonaj dialektoj. Ekzemple la etimologia [dj] sekvas en Slavono ĝuste ilian modelon, kiel videblas el la vorto *между* (inter), parenca al la esperanta *mezo* (greke μέσος) kaj *medio* (latine *medius*):

Serbe	dj → ĝ (међу).
Malnovruse	dj → ĵ (меж)
Pole	dj → dz (mędzy)
Ĉeĥe	dj → z (mezi)
Slavone, bulgare, ruse	dj → ĵd (между)

Ankaŭ la verbotensa sistemo de Slavono proksimas tiun de la klasikaj kaj sudslavaj lingvoj (kun aoristo, perfekto kaj imperfekto). En la lingvoj de la orientaj kaj okcidentaj slavoĵ restis nur unu preterito, nuancita per aspektoj.

Tamen serboj kaj bulgaroj opinias ke Slavono estas ege «rusigita». La malnovrusaj skribistoj ankoraŭ sentis diferencojn jam perditajn de la bulgara lingvo (ekz-e inter Ъ//я, аŭ Ъ//ъ); kaj la strukturo de la lingvo novrusa estas pli influita de Slavono ol ekzemple la moderna bulgara aŭ ia ajn alia lingvo slava.

La lasta trajto estas frapa kontraŭekzemplo por la Stalina tezo pri nevariema «baza leksiko»<sup>24</sup>:

En la leksiko ĉefas la baza leksiko kun la radikaj vortoj kiel la kerno. Ĝi estas malpli vasta ol la leksiko kaj vivas tre longe, dum jarcentoj, kaj prezentas per si la fundamenton por derivado de novaj vortoj.


Tamen en la rusa slavoniĝis prepozicioj (kiel la supre menciita *между*), personaj pronomoj (*тебѣ*, t.e. «al ci», anstataŭis la orientslavan *тобѣ*), sufiksoj (slavona *висящій*, *pendanta* anstataŭ prarusa *висячий*, kiu lasta ricevis la sencon *penda*) ktp.

Do, Slavono estis lingvo internacia kaj tamen sufiĉe proksima al ĉiuj tiamaj lingvoj slavaj. La skribaĵoj trovitaj en Novgorodo la Granda pravas, ke skribi povis urbanoj el ĉiaj sociaj tavoloj. Kaj efektan kontraston prezentas [franca ĉarto](#) (1063) kun kirilica subskribo de Anno Jaroslavidino (filino de la Kieva ĉefprinco Jaroslavo la Saĝa kaj franca reĝino) «ANA PЪИНА» [ana rəina], t.e. *Anno reĝino*, kiun ĉirkaŭas krucaĵoj de senkleraj nobeloj.

---

[24] J. Stalin: Marksismo kaj lingvoscienco. Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. — P. 20.

Restas tamen la demando, kial tiu ĝenerala klero ne alportis siajn fruktojn, kompareblajn (ekzemple) al tiuj de la araba kulturo. Ĉu pro la mongola invado? Ĉu pro troa kristaniĝo?



ANAPZHNA

# La parencorilatoj

Supozeble oni rimarkis ke iuj literoj rusaj kaj grekaj tre similas literojn latinajn, ke iuj similas kaj grafike kaj sone (A, E, K, M, O, T), dum aliaj similas nur forme (C, H, P). Kial?

Iam okazas ke nevo estas ege pli aĝa ol onklo. Ĝuste tia estas la rilato inter Kirilico kaj la latina alfabeto: Kirilico devenas rekte el la greka kaj hebrea, dum inter la alfabetoj latina kaj la greka ni trovas la etruskan, kiu iom konfuzis la literojn. Hodiaŭ mi konsideros tiujn rilatojn, precipe la literojn grafike similajn.

Oni scias ke la grekan skribon elpensis fenica reĝido Kadmo, sendite por serĉi sian fratinnon Eŭropo, forrabitan de Zeŭso. Tial antaŭe necesas ekzameni la skribon fenican.

## La skribo fenica

La fenica skribo estas fokuso en kiu konverĝas la tradicioj pli fruaj (ekde la egipta) kaj el kiu fontas la postaj skriboj mediteraneaj, de la hebrea ĝis la latina kaj slavona.

La fenicoj parolis ŝemidan lingvon kaj en sia skribo havis nur konsonantajn signojn. La nomojn kaj la ordon de tiuj signoj heredis la alfabeto greka.

En la kolumnoj de la ĉi-suba tabelo aperas:

1. signoj pra-kanaanaj (sinajaj), kiaj ili aperas en mura surskribo de minejo en *Sarabit al-Kadim* (Sinajo, ĉ. 1700 a.K.; la tiparo de [Yoram Gnat](#));

2. pli matura tiparo fenica, kian disponigas la *Noto*-familio;
3. parte esperantigitaj liternoj hebreaj kaj grekaj (la fenicaj nomoj estas tre similaj, sed malpli konataj);
4. la literoj de la alfabeto greka, kun *digamo*, *sampo* kaj *kopo*, kiuj lastaj havis nur specialajn uzojn ciferajn;
5. hebreaj literoj de la «kvadrata skribo», kiuj malmulte rilatas al la temo de ĉi tiu studaĵo – krom ke el װ (ŝino) kaj ם (cado) devenas la cirilaj Ш, Ц, Ч;
6. hebreaj literoj manskribaj (la tiparo [Refoyl](#)), kiuj restas pli similaj al la literoj fenicaj.

1	2	3: hebreaj kaj grekaj	4	5	6
𐤀	א	alef (bovo), alfo	A	א	Α
𐤁	ב	bet (domo), beto	B	ב	Β
𐤂	ג	gimel (kamel?), gamo	Γ	ג	Γ
𐤃	ד	dalet (fiŝo?), delto	Δ	ד	Δ
𐤄	ה	he (?) – epsilo	E	ה	Ε
𐤅	ו	vavo (hoko), digamo	F	ו	Ϝ
𐤆	ז	zajn (armilo?), (d)zeto	Z	ז	Ζ
𐤇	ח	ĥet (flosa) – eto	H	ח	Η
𐤈	ט	tet (rado?), teto	Θ	ט	Θ
𐤉	י	jod (brako), joto	I	י	Ι
𐤊	כ	kaf (mano?), kapo	K	כ	Κ
𐤋	ל	lamed (pikilo), lambdo	Λ	ל	Λ

1	2	3: hebreo kaj greke	4	5	6
𐌚	𐌛	mem (akvo), mu	M	מ ם	𐌛 𐌜
𐌜	𐌝	nun (serpento?), nu	N	ן ן	𐌝 𐌞
𐌞	𐌟	sameĥ (apogo) – ksi	Ξ	ס	𐌟
𐌠	𐌡	ajno (okulo) – omikro	O	ע	𐌡
𐌢	𐌣	pe (buŝo), pi	Π	פ ף	𐌢 𐌣
𐌥	𐌦	cado (kreskaĵo?), sampo	ᾗ	צ	𐌦 𐌧
𐌨	𐌩	kof (simio), kopo	Q	ק	𐌩
𐌫	𐌬	reŝ (kapo), rota	P	ר	𐌬
𐌭	𐌮	ŝin (dento), sigmo	Σ	ש	𐌮
+	𐌰	tavo (marko), taŭ	T	ת	𐌰

Vokalojn la fenicoj ankoraŭ ne scipovis izoli; fojfoje ili signis vokalon per «simila» konsonanto: la sonon [i] per jod, la sonojn [o] kaj [u] per vavo, ktp. Tian sistemon ĝis nun uzas la hebrea.

Por kelkaj literoj oni povas konjekti pri ilia piktograma deveno. Ekz-e 𐌫 (reŝ) efektive similas kapon sur la kolo (profile); 𐌛 (mem), same kiel la egipta *nut* (rivero) similas akvajn ondojn aŭ meandrojn de rivero (kaj tion konservas nia M).

Alia interesa trajto estas uzo de «diakritiloj» jam en la plej malnova alfabeto. La litero 𐌨 [ĥ] estas farita el la litero 𐌧 [h] per aldono de vertikala streko ĉe la literfino (t.e. maldekstre). La alspira 𐌠 [t<sup>h</sup>] estas farita per encirkligo de 𐌡 [t]. Kaj N estas duonigita simila M.



## La alfabetoj grekaj

La egiptoj malkovris la silabojn; la fenicoj malkovris la konsonantojn; kaj la grekoj malkovris la lastan ĉefelementon de evoluinta alfabeto: la vokalojn. De tiam la alfabetoj variis nur forme, ne principe.

Krome, la grekoj ŝanĝis la skribodirekton: anstataŭ skribi de dekstre maldekstren, kiel la egiptoj kaj ŝemidoj, ili ial, post iom da hezito, decidis skribi de maldekstre dekstren, kaj heredigis tion al ĉiuj skriboj Eŭropaj.

Ŝanĝinte la skribodirekton, la grekoj laŭe turnis la literojn:  $\Gamma$  iĝis  $\Gamma$ ,  $\text{Ϝ}$  iĝis  $\text{E}$ ,  $\text{Ϙ}$  iĝis  $\text{K}$ ,  $\text{ϣ}$  iĝis  $\mu$ ,  $\text{Ϟ}$  iĝis  $\text{P}$  ktp.

La sonon [w], kiun ankoraŭ havis iuj Homeraj versoj, la klasika greka perdis. Tamen la koncerna litero (F, «digamo») restis en la okcident-grekaj alfabetoj en rolo de cifero 6. Kaj poste la grekoj repruntis la literon vavo, en la formo Y, por signi [u], kaj lokis ĝin post la lastan fenican literon T (pli malfrue la pragreka [u] ŝanĝiĝis al la malnovgreka [ü] kaj poste al [i]).

Siajn vokalojn la grekoj faris el la fenicaj konsonantoj superfluaj por la greka lingvo: *alefo*, *ajno*. La delikata lingvosento de la Ioniaj grekoj scipovis distingi la longajn vokalojn disde la mallongaj, kaj ili enkondukis specialajn literojn por la longaj: omegon por la longa o, kaj eton por la longa ē. Tiel la litero  $\text{ĥet}$  iĝis *eto* (Hη). En la jaro 403<sup>a</sup> a.K. la atenanoj akceptis tiun Mil-etan sistemon, kiu poste disvastiĝis tra la tuta Grekujo. Sed kelkaj kolonioj okcidentaj konservis konsonantan karakteron

de tiu litero atribuante al ĝi la sonvaloron [h] (kaj heredigis ĝin al Latino).

Kaj fine, la grekoj ekuzis specialajn markojn por la akcentoj kaj tonoj (kiujn transprenis la skribo kirilica; sed la modernaj skriboj cirilaj pri tiu utila trajto plejparte rezignis).

## La etruska alfabeto

Neniu scias, de kie Italion venis la enigma gento etruska; tamen ie ili pruntis la arkaikan alfabeton pragrekan. La etruskoj skribis de dekstre maldekstren:

ΥΦΧV†‡ŔŦŦOΠΛWΛJ>I⊗⊖‡‡‡D>BA

t.e. respektive kaj alfabete

K<sub>3</sub>FXUTS<sub>2</sub>RQŜPOS<sub>1</sub>NMLK<sub>2</sub>I⊗HZVEDK<sub>1</sub>BA

La etruskoj perdis la ŝemidajn literonomojn (alfo, beto...), kaj unuecigis ilin per aldono de *-e* al konsonantoj (*a, be...*). Supozeble la sonantoj [l, m, n] povis formi silabon, do havis solsonan nomon, samkiel la vokaloj. La gentoj por kiuj [l, m, n] estis nur konsonantoj perceptis tiujn nomojn kiel *el, em, en*.

La etruskoj ne distingis vokalojn voĉajn disde senvoĉaj, ili havis kvar specojn de *k* kaj almenaŭ tri siblantojn.

Evidente, la fonetika sistemo esprimata de tiu alfabeto estis fremda al la hindeŭropaj lingvoj italiaj. Tamen ĝuste tiu alfabeto iĝis bazo por la latina.

## La alfabeto latina

La romanoj tamen ŝanĝis la skribodirekton, laŭ la greka maniero, kaj forigis iujn el la literoj kiujn ili ne bezonis. Tiel estiĝis 20-litera alfabeto latina: ABCDEFHIKLMNOPQRSTVX.

En ĝi la litero C estas rondigita gamo Γ, aŭ turnita etruska Δ; la literon *pe*, Ϝ kies krurojn la grekoj egaligis (Π), la romanoj (aŭ eble jam la etruskoj) turnis kaj fermis: P; kaj por distingi ĝin de roto, ili aldonis streketon: R (sed la malnovan formon sen streketo konservis la minuskla *r*).

Tamen tiu alfabeto restis tre malkonvena al la bezonoj de Latino. Ekz-e C en Latino signis kaj [g], kaj [k], tial la nomoj *Gajus*, *Gnæus* estis skribataj CAIVS, CNÆVS. T.e. la alfabeto retenis 3 signojn por [k] (C, K, Q), kaj neniom por [g]. Nur en la jaro 312<sup>a</sup> a.K. la censisto Apio Klaŭdo enkondukis diakritaĵon: C + trastroko → G, kaj metis ĝin en la lokon de la etruska Z (Ϝ), kiun Latino ne bezonis (poste Z reaperis fine de la alfabeto por transskribi pruntaĵojn el la greka). Tial Cicerono (*De natura deorum* 2, 37, 93) nombras 21 literojn.

La litero F komence signis [w], same kiel la greka digamo. Nu, la klasika Latino uzis V por la sonoj [u, ŭ, w] (la Cezara raporto *veni vidi vici* fakte sonis kiel [weni widi wiki]), sed ĝi bezonis ankaŭ literon por la para sono senvoĉa (en la Internacia Fonetika alfabeto: [ʍ]). Tian sonon havis la angla (kaj ĝi plu ekzistas en ties dialektoj); ortografie ĝin esprimas *wh* (ekz-e en *what, which, why*). Nu, Latino uzis esence la saman kombin-

on: FH. Do, F ĉiam aperis akompanate de H, kaj ĉar tia H estis klare redunda, oni reduktis la kombinon FH ĝis nura F.<sup>25</sup> Tiel iama vavo iĝis signo por [ɱ] — kaj poste por [f].

Post Cicerono la latina alfabeto ricevis la grekajn Y kaj Z, kaj tiel ĝi eniris Mezepokon 23-litera.

Dum Mezepoko la irlandaj skribistoj komencis distingi inter I kaj J (kiuj antaŭe estis samsignifaj grafikaj variaĵoj de I); kaj simile aperis la distingado inter U kaj V. Antaŭe la ĉefformo estis V, kiu en la pozicioj intervokalaj prezentis konsonanton, kaj la vokalon [u] inter konsonantoj. Ekz-e AVE = *ave*; AVGVSTVS = *aŭgustus*; fojfoje tio estis ne tuj evidenta: VVULA = *uvula*. Postrestaĵojn de tiu manko zorge flegas la angla tradicio, en kiu la fina *e* de la vortoj *love*, *leave* ktp servas por averti la leganton ke temas pri *v* (t.e. lov, leav), ne pri *u* (ke oni ne legu lou, leau).

Fine, post la enkonduko de W (kiun la angla, laŭ la malnova konfuzo, nomas «duobla U»<sup>26</sup>) formiĝis la 26-litera novlatina alfabeto: ABCDEFGHIJKLMNOPQRSTUVWXYZ.

Kurioze, en tiu alfabeto *kvin* literoj devenas el *vavo* (F, U, V, W, Y).

---

[25] Pri ĉi tiu semiotika meĥanismo vidu mian artikolon «[Grafe-mo](#)» (ankaŭ en la «[Lingva kritiko](#)»).

[26] Ĉi tiu konfuzo donas al ni la esperantistoj la eblon nomi la ne-esperantan literon w per kombino de la fontaj literoj: W=V+U=*vu*.

# Kirilico

La plej malnovaj skribaĵoj slavlingvaj estis faritaj per literoj latinaj kaj grekaj. Kiel diras monaĥo Ĥrabro,

Post kiam la slavo**j** baptiĝis, ili provis skribi la slavan parolon per la grekaj kaj latinaj literoj, sen adapto. Sed kiel eblas klare skribi per la grekaj literoj БОГЪ<sup>27</sup>, аѸ ЖИВОТЪ<sup>28</sup>, аѸ АЗЫКЪ<sup>29</sup> аѸ aliajn similajn vortojn?

Efektive, en la bizancia epoko la mezugreka lingvo perdis la sonon [b], kiun anstataŭis [v]; tial Kirilico ekuzis por [b] la grafikan varianton Б de la litero *beto*, konservante por [v] la mezugrekan ĉefformon В (samkiel la novlatina alfabeto diferencigis I kaj J, V kaj U). La latina alfabeto ne havis problemon pri [b], sed ankaŭ ĝi malhavis literojn por Ъ (mallongega o), Ж [ĵ], А (naza e) ktp. Entute Ĥrabro mencias 14 tiajn kromliterojn.

Tiel Kirilico disponigis sufiĉe plenan literaron por esprimi preskaŭ ĉiujn sonojn de tiama Slavono. Mankis nur aparta litero por distingi inter [i] kaj [j], kvankam estis du literoj, I kaj И, sendistinge uzataj por ajna el tiuj du sonoj.

**I**-dek estas samdevena kiel la latina I; kaj **И**-ok estas la greka eto (η), samdevena kiel la latina H (h). En la mezugreka lingvo la «longa e» iĝis [i], kaj en Slavono И iĝis la preferata litero por [i]; simila evoluo okazis pri la angla *ee*, kiun nun oni volonte

---

[27] [bogŭ], t.e. «dio» (greke mankas [b] kaj [ŭ]).

[28] [ĵivotŭ], t.e. «vivo» (greke mankas [ĵ] kaj [ŭ]).

[29] [ĝzikŭ], t.e. «lingvo» aŭ «lango» (greke mankas [ĝ], [i] kaj [ŭ]).

uzas por prezenti la sonon [i] en la ĉinaj nomoj *Lee, Mee*, en la araba nomo *Al-Ĵazeera* (Al-Ĝazira) ktp.

En sia fonetika rolo tiuj du i-literoj estis redundaj, kaj por la slavaj lingvoj senbezona estis  $\Phi\Omega\tilde{\Psi}\Theta V$ ; tamen ili estis uzataj por signi ciferojn en maniero konforma kun la kultura mondo-lingvo (la greka). Krome, ĉar la intervorta spaceto ne estis praktiko ĝenerale akceptita, oni uzis, ekz-e, la *oton* (= omegon)  $\Omega$  *vortkomence* kaj la simplan O mezvorte, por tiel marki vortolimon<sup>30</sup>; pro la sama motivo, ŝparante multekostan pergamenon, la angla ĝis nun markas la *vortofinon* per *y* (kp *fly* – *flies*).

Tri literojn, mankantajn en la alfabetoj greka kaj latina, Kirilico ĉerpis el la hebrea: Ц [c] kaj Ч [ĉ] devenas el *cado* (צ), Ш [ŝ] devenas el *ŝin* (ש).

En la posta evoluo Slavono kaj aliaj slavaj lingvoj ŝanĝis sian fonetikan sistemon, kio kaŭzis alfabetajn reformojn. Sed tio estas aparta temo.

---

## Literaturo

[MĤ] Monaĥo Ĥrabro. Pri la literoj. (Черноризец Храбър. О писменехъ.) – Sofio, 1980. – P. 113–143.

---

[30] En la skribo glagolica oni simile uzis la du formojn de i-dudek:  $\text{X}$  vortokomence, kaj  $\text{P}$  cetere (kiel en la versiklo sur p. 19).

[Pr] Г.М. Прохоров: Глаголица среди мисионерских азбук // Тр. Отд. др.-рус. лит. — Т. 45. — СПб: Наука, 1992. — С. 178-199.

[VK] La vivo de Konstanteno // Slovaka antologio. — Bratislavo, 1980. — P. 24-28. (Grandaj fragmentoj, tamen tradukitaj evidente ne el la originalo. La originalo samkie tiu de VM, [p. 89-109.](#))

[VM] La vivo de Metodio. (La originalo en: Климент Охридски. Събрани съчинения. Sofio, 1973. Vol. 3. [P. 185-192.](#))